

esperantoUSA

The ELNA

Newsletter: News of the language problem and Esperanto as a solution

1990 (X)

Making News This Issue

Gift of the Word

Donating books to libraries can be a bit like carrying coals to Newcastle. Librarians, burdened by a backlog of books, all too often relegate donations to basement storage. This article offers some tips on how to make sure that your donations of Esperanto books to the local library are noticed and used.

See Page 3

A Confusion of Tongues

Most Esperantists have more than a superficial knowledge of Esperanto's history. But what about the other international languages proposed through the years? Don Harlow shows just what pulled Esperanto to the head of the pack.

See Page 6

Leg-Antologie

Unu el la plej gravaj avantaĝoj de Esperanto por ĝiaj adeptoj estas ĝia utilo por konatiĝi kun aliaj kulturoj. Kaj la abundo de naciaj antologioj en Esperanto provizas al ni konvenan metodon por tion fari. Ionel Onet pritraktas la temon en pensiga artikolo.

See Page 10

In This Issue

Editorial	2
Book Reviews	11
Esperanto Travel Service	12

And Much, Much More to
Delight and Inform You!

Postal Course Reaps Rewards

SFSU & Postal Courses

by Catherine Schulze

[The following article originally appeared in the February issue of the bulletin of the San Francisco Esperanto Regional Organization.]

Following are excerpts from a letter written December 19th to me by Marc Ono:

Mi nun laboras por la Unuiĝintaj Nacioj en Nepalo. Mi estas tre kontenta kaj jam laboras kiel japana laboristo.


Nu, antaŭ unu semajno en Kathmandu mi partoprenis kunvenon de Bahaanoj kaj tie mi renkontiĝis kun multe da belaj Nepalaj Bahaanoj. Mi esperis trovi inter ili Esperantistojn sed estis neniuj. Sed ili diris al mi, ke multe da homoj tre interesiĝas pri Esperanto kaj jam serĉis iun kiu povas instrui

Esperanton dum longa tempo. Ili DEZIREGAS lerni Esperanton.

Ĉu vi konas Esperantistojn en Nepalo? Ili ankaŭ demandis al mi ĉu mi povos instrui Esperanton (fakte petegis min). Mi pensas, ke eble mi povos instrui Esperanton kun iu Nepala Esperantisto. Esperanto donis multe al mi, multe da belaj spertoj kaj geamikoj el tuta mondo kaj mi multe deziras fari ion por la movado. Ĝuste pro tio mi multe deziras, ke aliaj homoj povu kundividi tiajn belajn spertojn kun ni.

P.S. (written later) Antaŭ kelkaj tagoj nia oficejo hazarde ricevis oficialan leteron de

Continued on page 5



EDITORIAL

IF IT AIN'T BROKE...

Every now and then the editor, the ELNA Central Office, or somebody else, receives a list of suggestions for improving Esperanto. These range from proposals for orthographic reform (always very popular) to ideas for making Esperanto's grammar more modern and/or natural. The proposals may come from ELNA members or overseas individuals or groups.

There are two good answers to those who want to introduce "reforms" (more correctly, changes) into Esperanto. First: few of those suggested represent actual improvements. Second: Esperanto is the living, functioning language of an international collective, and no individual—not any individual member of ELNA, not the editor of *Esperanto U.S.A.*, not the Director of the Central Office of ELNA, not the General Secretary of UEA, not the President of the Academy—no one has the power to decree arbitrary changes in the language.

Let's look at two or three of the proposed changes that I have seen since I've been editor of this newsletter. One reader, a college student in the Midwest, proposed the introduction into Esperanto of a "familiar" second-person singular pronoun, corresponding to the French or Spanish *tu*, the German *du*, the Russian *ты*, etc. Indeed, this seems like something the language could use. In fact, that's just what Zamenhof originally thought when he introduced the second-person singular familiar form *ci* in 1887. This form has often been described as "stillborn" for the simple reason that almost nobody ever used it—certainly not in ordinary prose writing or conversation.

Another reader suggests that the plural in -J be changed to a plural in -S, in accord with the most common international usage. In fact, the -S plural is used in only five or six written languages (English, French, Spanish, Portuguese, Catalanian); and of these, the sound -S appears only part of the time in English (the plural more often has a /Z/ sound) and almost never in French, where it is silent. More commonly the plural is not shown at all, as in Chinese and, with at least a few words, in the Germanic languages, including English (*fish, sheep*).

One reader finds the occasional use of an initial C in Esperanto abnormal, and would do away with words that contain it. Actually, at least thirty percent of the world's people speak languages that use this sound in the initial position—not counting English, where it is sometimes found in foreign loan-words (*tsar, tsunami*).

Yet another proposal would create two new verbal auxiliary particles *le* and *me* (corresponding to the English *let* and *may*) to take some of the pressure off the -U ending, which, the reader understood, is often used to translate those two English particles. What the reader really encountered was a typical textbook English-language explanation which used two particular English constructions that rarely appear in real life except in such explanations of foreign-language constructions that don't occur in English. To create particles that exactly mirror the English *let* and *may* would, in fact, introduce into Esperanto a confusion that currently exists in English, but not in Esperanto (let me go to town = *lasu min iri en la urbon*, but let it be done = *ĝi estu farita*; may I go to town? = *ĉu mi rajtas iri en la urbon?* but may God's will be done = *la Dia volo estu farita*).

One common characteristic of several of these proposals is the underlying axiom: the way we do it in my language (here English) is the one and only right way. I try to inculcate in my beginning students from the very start an understanding that this is not so, by promulgating Harlow's First Rule of Learning Esperanto (or any other foreign language, for that matter): Esperanto is not English! If it were, there would be no need for it.

The rule doesn't always take. One of my students spent much time trying to improve Esperanto along the lines of languages that Zamenhof had somehow overlooked—for instance, Indonesian and Hopi. The result, when he went to Japan and first made the acquaintance of genuine Esperanto-speaking human beings, was instant incomprehension. His return to the fold of classical Esperanto was quite speedy.

Which brings us to the second point. Even if we looked at Esperanto and saw certain aspects worthy of repair or re-

form, this is not an easy task to undertake. No one knows how many Esperanto speakers there are in the world today, but the figure seems to run to several millions. And look at the anathema which has fallen on the head of author Karolo Piĉ, whose major crime was to propose half a hundred new word roots (no phonological or structural changes whatsoever), or the passions aroused by the relatively innocuous Country-name list proposed by no less an authority than Prof. Andre Albault, the President of the Academy of Esperanto. No, today even a justifiable reform (and I have yet to see one proposed) would be almost impossible to implement.

So let me finish the quote with which I began this column. New Esperantists, please note: If it ain't broke, don't fix it!

IF IT IS BROKE...

...then, friend, you may have troubles, especially if it's a hard disk and you haven't backed it up in a month or so! This is especially true of newsletter editors. Imagine having issue number two all ready to move onto a floppy to send to the typesetter and graphics designer, and then your daughter switches on the machine and you see... a disk query, because the hard disk is suddenly kaput!

Several articles and a number of letters bit the dust on that one! I will try to recover them for you in the months ahead—by going back to the authors for new copies, if necessary—and in the meantime let me only mention two of the lost letters: Carleton Carroll of Oregon, like Bernard Golden of Hungary (whose letter has survived), rightly took the editor to task for the miniscule size of the print in the comment at the end of Dr. Golden's article on Esperantists and satire several issues ago; and Stephen Tchudi wondered about the possibility of including articles in simpler Esperanto, or bilingual articles, in the newsletter. The second question is one that requires much thought. With regard to type size, we will try not to make type so small as to be invisible in the future. And we solemnly swear to do at least an incremental hard disk backup every Friday evening from here on out... if we don't forget...

—Don Harlow

Kiel Donaci E-Librojn al Usona Biblioteko

de Doug Portmann

[Doug Portmann, longtempa ano de ELNA, estas la kunverkinto, kun s-ano Koralo el Ĉinio, de la lastatempe eldonita Biblioteka Terminaro, kiu enhavas 1300 terminojn en lingvoj Esperanto, angla, ĉina, germana, franca kaj hispana.]

Mi estis petita de Michael Larkin, aktiva usona esperantisto, verki artikolon pri tio, kiel donaci Esperantajn librojn al usona biblioteko. La temo estas sufiĉe grava. Bibliotekoj, ĉu publikaj, universitataj, aŭ alispecaj, estas lokoj, al kiuj homoj kutime sin turnas por informoj. Se ili deziras trovi informojn pri Esperanto, ili probable trovos nenion en tipa usona biblioteko, aŭ nur eta mizera kolekto de mucidaj, arkaikaj E-libroj el fora epoko. Kiel do ĝustigi tiun mizeran situacion?

Unue, oni devas starigi la ĝustajn demandojn. Kiujn E-librojn oni donacu? Kiom multe al unuopa biblioteko? Kiel oni donacu? Al kiuj bibliotekoj?

Ni konsideru la lastan demandon unuavice. Miatakse, oni donacu E-librojn al publikaj kaj universitataj bibliotekoj, precipe tiuj, kies librohavo estas ĝenerala (ne specialigita). Kvankam mi ne difinas al vi optimuman grandon de cel-biblioteko, laŭ mi ju pli granda estas la biblioteko, des pli efika estas la donacagado. Ne disipu vian tempon donacante E-librojn al fakaj (specialigitaj) bibliotekoj, ekz. industri-bibliotekoj. (Mi laboras en unu tia.) Tiaj bibliotekoj servas limigitan uzantaron.

Nun ree al la unua demando. Se la biblioteko, kiun vi celas, estas malgranda aŭ meza biblioteko (malpli ol 50,000 volumoj), konsilindas donaci nur kelkajn librojn. *Estas preferinde donaci kartonitajn (tolbinditajn) librojn.* Nu jes, multaj bibliotekoj akceptos broŝuritajn librojn ("paperbacks"), sed ili ne videblas bone sur la bretoj, eĉ se ili sukcese atingos la bretojn. (Akceptite, ili eble estos venditaj por gajni monon por la biblioteko. Aŭ eble ili estos lokitaj aparte en la biblioteko en speciala bretaro por broŝuritaj libroj—inter la amromanoj kaj sciencfikciaj rakontoj!) Sed mi rekonas, ke multaj gravaj E-verkoj haveblas nur

en broŝurita formo.

Mi rekomendas donaci jenajn tipojn de E-libroj:

1. lernolibroj (inkl. sonbendoj, ktp.)
2. vortaroj: angla-esperantaj
3. vortaroj: esperanta-anglaj
4. informlibroj (anglalingvaj)

Ili povas esti donacitaj al malgrandaj bibliotekoj aldone al grandaj. Ili reprezentas la plej ĝeneralan, kernan grupon de E-libroj, kaj estas alireblaj al neesperantistoj, ĉar ili skribiĝas almenaŭ parte en la angla.

Inter la lernolibroj donacindaj elstare estas la moderna Esperanto: **Learning and Using the International Language** de D. Richardson. Ĝi estas tolbindita, uson-orientita, kaj havas apartan antaŭsekvon de informoj pri Esperanto. Aliaj eblecoj estas: **Step by Step in Esperanto** de M. Butler kaj **Esperanto** de Cresswell & Hartley (Teach Yourself Books). La unua estas sistema kaj tolbindita, sed verŝajne tro didaktika por la meza usonano. La dua estas malkara kaj ilustrita, sed broŝurita. Ambaŭ estas britaj.

Da donacindaj vortaroj estas malmultaj. Por angla-esperanta vortaro oni povas elekti inter **English-Esperanto Dictionary** de Fulcher kaj Long (3a eldono, represita 1985) kaj la **Esperanto Dictionary** de J. C. Wells (Teach Yourself Books). Ambaŭ estas britaj kaj broŝuritaj, kvankam mia ekzemplero de la unua havas iom pli dikan kartonan kovrilon. Por la esperanta-angla elekto, haveblas la fidinda **Esperanto-English Dictionary** de M. Butler. Ĝi estas tolbindita.

Informlibro donacinda estas **Esperanto in the Modern World** kompilita de la kanadanoj R. kaj V. Eichholz. Ĝi estas kartonita. Speco de informlibro oni povus ankaŭ konsideri la verkon **Zamenhof: Creator of Esperanto** de M. Boulton. Ĝi estas respektata biografio de la fondinto de Esperanto.

Vidu la bibliografion en la pli ampleksa versio de ĉi tiu artikolo (vidu la finan alineon) por listo de donacindaj libroj. Se temas pri granda publika aŭ universitata biblioteko, vi povas konsid-

eri aliajn tipojn de libroj, do:

5. tut-Esperantaj vortaroj
6. literaturajoj (precipe tradukoj el la klasikajoj de la mondo)
7. fakaj libroj en Esperanto (inkl. de sciencajoj)
8. religiaj libroj (ekz., la Sankta Biblio)
9. konsultlibroj esperantlingvaj (ekz., la **Enciklopedio de Esperanto**)
10. lingvistikaj kaj esperantologiaj verkoj, ktp....

Por tiaj bibliotekoj, la broŝuritaj estas pli tolereblaj. Sed prefere ne malŝparvian tempon (kaj monon), provante fordoni E-broŝurojn kaj faldfoliojn al biblioteko. Ili eble estos demetitaj en pendoteko (angle: *vertical file*), kie ili ripozos trankvile. Sed pli kredeble ili estos forĵetitaj. Tamen ili taŭgas por bibliotekaj ekspozicioj. Kaj mi dubas, ĉu estas sencoplene donaci E-gazetojn kaj abonojn al bibliotekoj, krom tio, ke estas loka E-grupo. Tio povas esti farita, se temas pri granda donaco al granda biblioteko. Tiam vi bezonas specialan interkonsenton kun tre kunlaborema biblioteko. Pli pri tio ĉi sube.

Antaŭ ol alpaŝi rekte al la bibliotekisto por donaci ion, kontrolu la bibliotekon. Ĉu fakte ĝi havas Esperantajojn? Serĉu en la kartoteko (sliparo) laŭ temoj. Nature konsultu la temon ESPERANTO. Sed ankaŭ provu aliajn: LANGUAGES, ARTIFICIAL; ESPERANTISTS; PHILOLOGISTS; LINGUISTS; LANGUAGE PLANNING; LANGUAGES, UNIVERSAL; DIPLOMACY, LANGUAGE. Tiuj ĉi donitaj temrubrikoj estas oficiale uzataj de la *Library of Congress* kaj multaj aliaj usonaj bibliotekoj. Vi povas ankaŭ konsulti netemajn rubrikojn kiel "Zamenhof". Se vi trovos slipojn por E-libroj, tiam iru al la bretaro por vidi, ĉu ili fakte tie troviĝas. (Povas esti, ke ili malaperis antaŭ longe.) Se ne, demandu la pruntistinon, kio okazis al ili. Se vi trovas, ke tiu biblioteko havas aktualan, ampleksan, katalogitan E-kolekton, vi povas kontente forlasi tiun mir-bibliotekon sen plia agado.

Continued on Page 4

Sed en la reala mondo, tiaj bibliotekoj en Usono estas probable pli maloftaj ol vivaj idistoj. Nun kion fari? Nu, vi pretas alpaŝi al la bibliotekisto kaj demandi, ĉu ŝi (aŭ li) konsentas akcepti E-librojn kiel donacojn. Sed eĉ nun, vi devus prepari vin zorge. Dubebblas, ĉu la mezvalora bibliotekisto aŭdas multe pli ol nenio pri Esperanto. Kial oni akceptu librojn pri tiom ekzotika temo? Eble vi eku, demandante ĉu estas intereso inter la bibliotekuzantoj pri: 1) fremdaj lingvoj, 2) internaciaj aferoj, aŭ 3) kiel akiri leteramikojn. Tiam vi povus demandi, ĉu estas intereso pri Esperanto. (Verŝajne necesos tie ĉi klarigi, kio estas E-o.) Eĉ se la respondoj estas negativaj aŭ indiferentaj, vi nun povas (dank' al via preparo) informi la bibliotekiston, ke mankas E-libroj en la biblioteko, kaj ke vi volas ĝustigi tiun ĉi mankon per donaco.

Nature, se la biblioteko jam havas kolekton de E-arkaikaĵoj, vi povas simple atentigi pri tio, petante ke oni ĝisdatigu tiun kolekton per modernaj E-libroj.

Se temas pri malgranda aŭ meza biblioteko, konsilindas *ne* donaci pli ol tri aŭ kvar libroj, el la grupoj 1-4 cititaj pli frue. (Kaj plivole donacu po unu libron el ĉiu grupo.) Escepto estas, se ekzistas loka E-grupo. Se oni pretas akcepti vian donacon, demandu, ĉu la E-libroj estos katalogitaj kaj metitaj sur la bretaroj por ebligi pruntadon. Se vi ricevas negativan aŭ nekularan aŭ "nu..."-an respondon, mi konsilus redukti la donacon al nur unu aŭ du libroj, kaj provu alian bibliotekon.

En tiaj traktadoj kun bibliotekistoj, vi povas atentigi pri la havebleco de katalog-slipoj por komerce publikigitaj E-libroj. Ekzemplo estas Esperanto: *Learning and Using the International Language* de D. Richardson. Se vi vidus sur la dorsflanko de la titolpaĝo de tiu libro, vi trovos katalog-donitaĵojn por la libro (nome: "Library of Congress Cataloging-in-Publishing Data", mallongige CIP). Tion ŝatas bibliotekoj, ĉar tio faciligas katalogadon. Eĉ se la libro havas tie nur "Library of Congress Catalog Card Number", tio faciligos katalogadon, ĉar uzante tiun ĉi numeron, biblioteko povas mendi komercajn katalog-slipojn por la libro. Tiuj slipoj estas preparitaj de la usona nacia biblioteko, la "Library of Congress" (LC), aŭ de alia fonto, ofte uzante donitaĵojn ĉerpitajn de LC.

Krom la Richardson-libro, tiu numero ne aperas en tiuj suprecititaj libroj sur la

dorsflanko de la titolpaĝo. Mi konsilas, ke vi enskribu ĝin tie. (Ekzemple: L.C. NUMBER 79-135467.) Tiam sciigu la bibliotekiston pri via enskribo, por ke tiu sci, ke temas pri jam katalogita libro, kaj ne pri "strangula" libro. Tio ŝparas al tiu biblioteko tempon, kaj probable favore influos ĝin al akceptado kaj katalogado de viaj E-libroj. LC-numeroj de rekomendataj libroj troveblas en la bibliografio de la pli ampleksa versio de ĉi tiu artikolo (vidu la finan alineon).

SENKOSTAJ E-LIBROJ

Ĝis nun mi skribas pri donacado, sed estus nature pli bone, se la celata biblioteko mem aĉetos kaj pagos kaj katalogos la E-librojn. Ĉu efektivebla? Jes, eble, precipe se ekzistas loka E-grupo, kiu uzos ilin. Se ĝi ekzistas, nepre informu la bibliotekiston. Tiel ŝi aŭ li konscios, ke viaj E-libroj faros pli ol sidi sur la bibliotekaj bretoj, altirante polvon. Alia kialo instigi la bibliotekon mem aĉeti E-aĵojn estas se ĝi havas grandan kolekton de libroj en fremdaj lingvoj. Tiam vi povas prezenti E-librojn kiel naturan komplementon al tiu kolekto.

Nepre kunportu prezliston aŭ katalogon de aĉeteblaj E-libroj. Fotokopiu la paĝojn el tiuj listoj, kiuj havas la librojn, kiujn vi volas aĉetigi ĉe la biblioteko. Marku tiujn librojn. Nepre precize indiku, de kie la libroj povas esti menditaj. Taŭgaj prezolistoj estas tiuj publikigitaj de ELNA, ekz. "Esperanto 1989 Catalog", aŭ tiuj listoj dissendataj de *Bern Wheel Books* (Ŝtato Illinois). Sed prefere ne uzu listojn, kiuj ne citas la dolar-prezon de libro aŭ kiuj listigas librojn, kiuj estas haveblaj nur de trans-oceanaj eldonistoj. Multaj bibliotekoj (precipe publikaj) ne mendas librojn de ekster Usono. Ankaŭ indiku la LC-numerojn. Tiel agente, vi plialtigas la ŝancojn, ke la biblioteko decidus aĉeti E-librojn.

GRANDA DONACO DE E-LIBROJ AL BIBLIOTEKO

Agu zorge! Alie, via donacota kolekto de valoraj E-libroj vaporigĝos kaj utilos al neniu. Ni parolas pri grandaj kolektoj de 50 aŭ 100 aŭ pli, ekz. postlasitaj kiel heredaĵo. Povas temi ankaŭ pri broŝuroj kaj kolektoj de E-gazetoj. Mi konsilas, ke vi:

1) konsideru nur grandajn publikajn kaj universitatajn bibliotekojn, precipe tiujn kun grandaj kolektoj de neangla-lingvaj libroj.

2) se eble, donacu al bibliotekoj proksime al loka E-grupo.

3) parolu kun la bibliotekistoj ĉe celbiblioteko, kaj demandu scii, kia estas la donacopolitiko de la biblioteko.

4) konsideru nur bibliotekojn kun adekvata personaro kaj bona konstruaĵo.

La ideala celbiblioteko donos klarajn kaj pozitivajn respondojn al viaj demandoj. Ĝi katalogos viajn librojn kaj igos ilin prunteblaj. Ĝi havos fotokopian servon, tiel ke E-isto ie ajn en Usono povos mendi kopiojn el sekcioj de tiuj libroj aŭ gazetoj. Aŭ ĝi pruntedonos ilin, pere de la interbiblioteka pruntoservo. Ĝi estos membro de granda biblioteka reto kiel OCLC, tiel disponigante sian librohavon al uzo de aliaj bibliotekoj. Ĝi bindos viajn gazetvolumojn. Ĝi daŭre mendas E-librojn, kaj ne rigardos vian donacon kiel finitan kolekton. Ĝi eĉ komplezeme preparos presitan katalogon de la E-kolekto, kiel faris la *University of Oregon Library*.

Vi povas provi persvadi la bibliotekon per la samaj argumentoj kiel notitaj frue. Precipe atentigu, ke la donacotaj libroj estas maloftaĵoj, ke malmultaj bibliotekoj en Usono ilin posedas, kaj ke ekzistas loka E-grupo, kiu uzos ilin.

La loka E-grupo estas duoble grava, ĉar ĝi povas daŭrigi intereson pri Esperanto dum longa periodo de tempo. Se ne, la amikaj bibliotekistoj, kiuj akceptis vian grandan donacon, povas demisii aŭ transloĝigi, kaj ekoficos novaj bibliotekistoj, kiuj rigardos la E-kolekton kun indiferento, scivolante, kial la biblioteko subtenu grandan kolekton de neuzataj paperoj. Fina rezulto: la E-libroj estos forĵetitaj aŭ senditaj al mucida tenejo aŭ kelo.

Por igi la bibliotekistojn pli pretaj akcepti la kolekton, konsilindas antaŭprepari ilin. Skribu la LC-numerojn en la libroj kiel notitaj supre, laŭ viaj eblecoj. Riparu difektitajn librojn, Kontrolu la volumojn de gazetoj por kompleteco, kaj notu mankantajn numerojn. Bona ideo estas prepari plenan skriban inventaron de via kolekto, kaj fakte la ricevanta biblioteko eble tion postulos. Alia helpo al la ricevanta biblioteko estas, se vi preparas slipon por ĉiu gazeto kaj libro, al kiu mankas LC-numero. Koncize resumu la enhavon en la angla, kaj notu iujn elstarajn trajtojn de la ero, kiuj povas helpi la katalogiston. Tiaj utilaj informoj, se ne evidentaj sur la titolpaĝo aŭ ties dorsflanko, estas: eldon-

Bibliotekoj from Page 4

informo (loko, eldonisto, jaro); seri-eldiro; kaj aŭtoreco. Tiel, la katalogisto povos elekti la temrubrikojn kaj prepari la katalogajn slipojn, ne scipovante Esperanton.

Unu fina demando. Ĉu estas pli bone peti, ke via granda donaco de E-ajoj estu integrita en la kolekton de la biblioteko, aŭ ke ĝi estu lokita en aparta sekcio? Mia opinio, integrado estas pli bona. Tiel la E-libroj estos pli firma parto de la biblioteko, kaj espereble malpli forĵeteblaj. Sed se la kolekto estas tre granda (pli ol 1000 eroj), ĝi probable meritas specialan sekcion.

KONKLUDO

Mi avertas la leganton, ke mi prezentas tie ĉi en jena artikolo konsilojn ne fundamentitajn en praktika sperto.

Bibliotekistoj estas homoj, kiuj tre kredeble rilatas al Esperanto ne pli aŭ


malpli favore ol la cetera homaro. Se vi volas efike donaci al biblioteko, estas ja bone scii, kion ili faras kaj kiel funkcias biblioteko. Bibliotekoj ricevas multajn donacojn. Se ili akceptas la erojn, ili agas tiele:

- 1) katalogos kaj metas ilin en sian kolekton.
- 2) metos ilin en specialan kolekton.
- 3) interŝanĝos ilin por aliaj libroj.
- 4) vendos ilin.
- 5) forĵetos ilin.
- 6) faros nenion krom lasi ilin sidi en iu malhela angulo.

Evidente ni volas, ke la biblioteko agu laŭ alternativo 1, aŭ eventuale 2. Se vi agas laŭ la konsiloj donitaj supre, tiam mi opinias, ke via donacado estos pli efika kaj frukta.

Mi havas pli longan variaĵon de tiu ĉi artikolo, kiu havas piednotojn kaj bibliografion de donacindaj E-verkoj, kune

kun katalogaj informoj por ili. Vi povas mendi tiun okpaĝan dokumenton de mi ĉe la adreso de Doug Portmann, 1351 W. Melrose Dr., Westlake, OH 44145. Bv kunsendi memadresitan, afrankitan (50 cendoj) koverton.



SFSU/Postal from Cover

nepala juristo petantan informojn pri la rajtoj por infanoj—(ĉu vi scias, ke en Novembro la Ĝenerala Asembleo de la UN adoptis la Konvencion de la Rajtoj de Infanoj kaj tiu temo estas vaste diskutata nuntempe) kaj demandis ĉu ni havas informojn en diversaj lingvoj inkluzive ESPERANTON!!!

Tiu letero venis al mi ĉar mi gardas tiun temon en nia oficejo. Vi ne povas imagi kian ĝojon tiu letero kunportis al mi ĉar mi ĵus skribis al vi pri Esperantistoj tie ĉi en Kathmandu. Nu, mi tuj telefonis al li kaj mi eksciis ke fakte li estas Esperantisto kaj li diris al mi, ke estas kelkaj Esperantistoj en Kathmandu. Do, li venis al mia oficejo la sekvantan tagon kaj decidis renkontiĝi denove post tri tagoj (tiam kun aliaj Esperantistoj)—la naskiĝtago de Zamenhof.

Mi pensis, ke venos nur kelkaj Esperantistoj sed venis eble 40 personoj (ne Esperantistoj) kaj petis min paroli pri Esperanto. Mi tute ne estis preparita sed parolis pri Esperanto kaj miaj spertoj kun Espe-

ranto. Ili deziras komenci studi Esperanton kaj ili petis min instrui la lingvon. Do, mi (nun certe) deziras vian konsilon pri instruado precipe al komencantoj. Ĉu vi eble povos sendi kelkajn materialojn ankaŭ?

NOTE: A UN diplomatic pouch goes out from New York three times weekly to Kathmandu. Address: Masahiro Marc Ono, UNICEF KATHMANDU, P.O. Box 5747, New York NY 10163-5747.

It is a source of joy for me to get reports from many like Marc who are making real contributions—former postal students who then went on to San Francisco State for advanced study. Opening the mail every day is a genuine adventure. Bill Schulze opens and sorts out the most urgent—as with Marc Ono's letter.

ELNA's underwriting of the Free Postal Course and fostering of the San Francisco State University courses, through the SFSU Fellowship awards, is proving valuable. Marc began the postal course with Cathy Schulze while at International Studies Institute, Monterey (CA). There are others like him who come to mind—for example, Edward Schlesinger, formerly at Cal Poly, San Luis Obispo (CA), who is now teaching agriculture at Ruaha Secondary School in Iringa, Tanzania. Mark Fettes, editor of UEA's review *esperanto*, took ad-

vanced studies at SFSU.

Dr. John Birmingham, who began with the postal course, advanced to SFSU, and now teaches Esperanto at Virginia Commonwealth University. And there is Ward Giannini who teaches at Tempe, Arizona; David Wolff, who did such an outstanding job of the financial campaign for publication of the Richardson book, did advanced studies at SFSU; Charles Mays, motor of the Virginia and Carolinas district, began with the postal course, as did Sherry Wells, the indefatigable worker in the Michigan state organization. Prof. Tomas Sarramia is another who has made headlines through excellent articles in Spanish language journals and newspapers in Puerto Rico.

Derek Roff of the Intermountain group has a long list of kudos for his work in the district and several years here at SFSU. David Barron of Boise, Idaho, is another postal student who has had enormous success with the news media and teaches Esperanto at the university. Neal and Holly McBurnett in Boulder, Colorado, are graduates of the postal and SFSU courses. Neal has contact with many Esperantists via the computer network USENET. Karl Heuer of Cambridge, Massachusetts, another postal and SFSU student, has brought me a fine postal student from Oslo, Norway, via computer contact. Karl now edits the New England newsletter *Verda Lumo*.

Masters of Tongue Fu

by Donald J. Harlow

[Note by the author/editor: I wrote the original of this article last summer and have kept it handy to use in the newsletter whenever space would present itself. The subject seems to be of more interest today than it has been in the recent past, and—since I have (temporarily?) lost some articles with a disk crash, mentioned in the editorial—I am taking the liberty of rewriting it and using it in this issue. New members in particular may find it interesting. Since the subject is not discussed at any length in David Richardson's *Esperanto: Learning and Using the International Language*, those who are interested in the international language movement in more general terms may find it useful.]

When people say “International Language” today, they are probably talking about Esperanto. In China, in fact, the language is better known as *shi jie yu*, which simply means “international language,” than as “Esperanto.” In those parts of the world where “interlinguistics” is an accepted part of the science of linguistics, articles on the subject—if they are not purely historical in nature—will almost certainly refer almost exclusively to Esperanto. Discussions of the literature of artificial languages will concentrate totally on that of Esperanto, since only very underdeveloped literatures exist for other artificial languages, and, for most of them, don't exist at all. Any study of the sociology of an artificial language, too, will concern itself only with Esperanto, since only two other artificial languages ever had populations of adherents even remotely comparable to that of Esperanto, and then only for very short periods of time.

But Esperanto is neither the first nor the only “international language.” Attempts to create such a language go back at least to the thirteenth century, when the Abbess Hildegard of Rupertsberg, a


lady more recently exhumed—and justly so!—by the women's movement, the gnostics, and various musical organizations (how refreshing it is that Hildegard, one of the earliest of the “Renaissance Men,” was a woman!), created her “Lingua Ignota.” The philosophers Comensky, Leibniz, and Descartes all wrote about the international language; Bishop Berkeley worked at developing one. In the last century, the Frenchman Sudre created Solresol, a language meant to be whistled or trumpeted, and it enjoyed a very long period of popularity in some circles in France; at one point the French military even considered adopting it, possibly because trumpets can be heard over greater distances than shouted commands. Who knows? Had the French followed through with this idea, their defeat in the Franco-Prussian War in

modified ethnic languages, such as Basic English. But of the thousand or so such languages, only a few have ever attained any degree of popularity, and most of that has been spurious—a creation of the news media, ever in search of some new and interesting story. Chronologically, these most famous of international languages have been: Volapuk, Esperanto, Ido, Occidental, Basic English, and Interlingua. For those who know little or nothing about the origins and fates of these languages, I would like to give an introduction to them.

Volapuk was invented in 1880 by a German priest, Monsignor Johann Martin Schleyer. Schleyer, a polyglot, recognized among his less talented parishioners the need for a language to communicate across national boundaries, and set out to create one. The result was

Volapuk. The language enjoyed tremendous popularity over the next decade, but, because of certain aspects of its grammar and vocabulary, it generated a strong movement for reforms among many of its speakers; and Schleyer, who saw himself as the language's Pope, so to speak, refused to even consider such reforms. The language's most vocal adherents split into two factions, one supporting Schleyer and one supporting his chief opponent, a French professor named Auguste Kerckhoffs. The resulting struggle destroyed the language, many of whose proponents in any case were shifting their allegiance to the rising (green) star of Esperanto by the end of the eighties. By the beginning

of the new century, Volapuk was all but dead, though at least one (very small, very irregular) bulletin in the language seems to have appeared as late as 1960. When Bernard Golden went in search of speakers of Volapuk on the language's 100th birthday, he found a total of ten—



1871 might not have occurred, and all later history would have been different.

No one knows how many “international languages” have actually been proposed. The figure certainly exceeds a thousand. These range from genuine *a priori* languages, all of whose material is invented out of whole cloth, to slightly

Continued on Page 7

Tongue Fu from Page 6

all of whom also spoke Esperanto.

It is worth noting, however, that at its peak Volapuk boasted perhaps 100,000 adherents—though how many of them could actually speak the language is open to question. In this regard, it is interesting that it shared several characteristics with Esperanto. The two of these that are perhaps most important, in my view, are: (1) an agglutinative system of word-formation, in contrast to the standard Indo-European system (more correctly: lack of a system); and (2) the desire of the inventor to solve the problem of communication between people of different languages, not just to invent an artificial language.

I don't want to go into Esperanto's history in any detail here. If you want to read a good book about the early period, get a copy of Edmond Privat's *Historio de la Lingvo Esperanto*, or his *Vivo de Zamenhof*. I would only wish to say that, more than a hundred years into its existence, Esperanto's eventual fate has not yet been decided. Given that over its history the language has had few friends, except for a (relatively few) far-sighted and courageous souls who have actually gone out and learned it, while it has succeeded in gaining for itself a notable array of enemies—Adolf Hitler and Josef Stalin spring immediately to mind—the staying power that the language has demonstrated is quite encouraging.

Let me only add here that Zamenhof, like Schleyer, was interested not in creating an artificial language but in finding some viable solution to the problem of communication between different peoples. And in Zamenhof's case—he was a Jew living in late 19th century Russia—the problem was far from a theoretical one.

Zamenhof stated (in his *First Book*) that Esperanto was not your typical European language. Arguments over Esperanto's Europeanness go on even today. Certainly, despite recent modest accretions from Japanese and other non-European languages, Esperanto's lexical material remains primarily European, chiefly Romance, in origin. Other aspects of the language's structure are less convincingly European. Certain tendencies in popular use of the language—for instance, the occasional doubling of short adjective roots to show emphasis, rather than through use of the -EG suffix—show a pattern of thought in the language

reminiscent of Chinese.

I don't intend to argue here over whether Esperanto is fundamentally European or non-European; but certainly many early speakers of the language in Western Europe found it less European (more particularly, less West-European) than they would have liked. This was particularly true in France, where many early leaders of the national Esperanto movement would have preferred a more Francophone, or even Anglophone, tone to the language. A few of these gentlemen, in fact, through a rather underhanded process, set themselves up as "reformers" of Esperanto, and in 1907 produced a version of Esperanto that appeared much more in tune with the linguistic norms of the world—i.e., French and English. For a while, they expected that their new language would replace classical Esperanto, but when this did not happen—a vast majority of ordinary speakers of the language refused to make the necessary changes in their habits—the "reformed Esperanto" split off and became an artificial language in its own right, Ido.

